

22
-19119/
(1960)
22

Oomoto

MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U. H. A. ★

1
9
6
0

Sept.-Oktobro

22-a Jaro N-ro 243-244 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo.

Abonprezo: ₡ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Tokio-Apelacio

La Sesa Mondkongreso kontraŭ Atom- kaj Hidrogenbomboj kaj por Totala Malmarmado okazis dum ok tagoj, 2—9 aŭgusto 1960, en Tokio, kun partopreno de pli ol dekmil personoj, inkluzive de 119 reprezentantoj el la eksterlando. Jena estas la teksto de *Tokio-Apelacio*, kiun ili proklamis por “batalo” kontraŭ la militfortoj de la mondo. Ĝi estas parte kritikita en “*La 15-a Datreveno*” sur p.153 de ĉi tiu numero. La Red.

Okaze de la 15-a datreveno de la atombombado en Hiroŝima kaj Nagasaki, pli ol 10,000 popolaj reprezentantoj el ĉiuj kontinentoj de la mondo kaj el ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de Japanujo kolektiĝis en Tokio por la 6-a Mondkongreso kontraŭ Atom- kaj Hidrogenbomboj.

La eksterlandaj reprezentantoj partoprenis la Mondkongreson kun la celo apogi unuanime la japanan movadon kontraŭ A- kaj H-bomboj kaj ankaŭ subteni la batalon de la japana popolo kontraŭ la lastatempa revizio de Japana-Usona Sekurec-traktato, rekonante ke ambaŭ luktadoj multe kontribuas al la starigo de mondpaco.

Dum tiu ĉi Mondkongreso oni povis interŝanĝi la valorajn fakspertojn de la pacmovadoj en Japanujo kaj en ĉiuj aliaj landoj de la mondo. Oni rekonfirmis, ke la batalo de ĉiuj pacamantaj popoloj direktas sin al unu sama celo. Tiel oni pruvis, ke tiu ĉi kongreso estas “mondkongreso militanta” por paco kaj samtempe la granda kunfluejo de ĉiuj pacfortoj de la mondo.

La popoloj de la mondo, kiuj aspiras al la paca kunekzistado de la ŝtatoj havantaj la malsamajn reĝimojn kaj forrifuzas ĉian agreson kaj militon, ĉiam pli sincere deziras nuligon de A- kaj H-bomboj, la efektivigon de totala malmarmado, la malnecesigon de militaliancaj traktatoj kaj la abolon de fremdarmeaj militbazoj.

Tiuj deziroj de la pacamantaj popoloj devas, kaj certe povas, esti

Oomoto, mondsava religio (2)

de Sakae Kobajaŝi

(3)

Asistanto aŭ organizanto estis bezonata de la Fondintino, por ke la revelacio de la "Dio en la Nordoriento" estu interpretata kaj kaptu la homajn korojn. Estis en 1898, ke Kisabro Ueda, kiu poste ŝanĝis sian nomon je Onisabro Deguči kaj fariĝis famkonata pro sia unika personeco, unuafoje konatiĝis kun la Fondintino. Dum la Fondintino estis la edzino de seneduka ĉarpentisto, Kisabro estis tre studema. Kiam li estis ankoraŭ nur dektri-jara, li oficis kiel asistanto-instruisto ĉe elementa lernejo de la vilaĝo. Li studis japanajn kaj ĉinajn klasikaĵojn, filozofion, japanan poezion kaj veterinaran scienccon. Post kiam la patro mortis, li entreprenis mastrumon de laktejo, kie li mem laboris kiel melkisto kaj laktisto. Li okupiĝis ankaŭ en la kolektado de brullignoj, kies faskojn por vendi li portadis per ĉaro de Anao al Kioto en distanco de proksimume dekkvin mejloj. Laŭ poemoj verkitaj de li en tiu tempo, estas evidente, ke li jam grave koncernis sin je la maljusteco kaj malegaleco de la socio en kiu li vivis. Estis en tiu tempo, ke li vizitadis ankaŭ kristanan preĝejon en Kioto. Poste, kiam li verkis seriojn de "Rakontoj el la Spirita Mondo", li komparis la interrilatecon de la Fondintino kun si kiel tiu de Johano la Baptisto

kun Jesuo Kristo. En tiuj verkaĵoj troviĝas kelkaj citaĵoj kaj aludoj, kiuj indikas ke li estis sufiĉe influita de la rakonto de la Biblio. Li multe ŝatis kristanajn himnojn. En la Oomoto-himnoj, kiujn li mem verkis, estas kelkaj, kiuj klare montras la fakton, ke li elprenis ilin el la kristanaj. Lia serĉado de vero en religio etendiĝis ankaŭ al ne-kristanaj religioj. Li vizitis diversajn religiajn grupojn kaj studis iliajn ĉefajn doktrinojn. Sed li lernis ankaŭ, ke tiuj religioj estas koruptitaj kaj tial drasta religia reformado estas necesa. Li estis junulo, kiu vivis en malgranda vilaĝo, memlernis, kreskigis fidon en si, interesiĝis en la socio kaj havis grandan fizikan forton kaj kuraĝon, kaj estas ne miro, ke li ekhavis la spiriton rezisti kontraŭ la tiama socio kaj ĝin reformi. Unu tagon, okazis ke kelkaj apaĉoj de la vilaĝo provokis lin al batalo; li akceptis, sed estis draŝita de ili per pied- kaj pugnobatoj. Venkite li kuris hejmen. Tiam lia avino severe admonis, ke li neniam ripetu tian stultan miskonduton. Li profunde pentis. Lasinte hejme pecon da skribaĵo, li eliris kaj supreniris la monton Takakuma, kie li trovis kaverneton kaj tie restis unu semajnon por kontemplado. En la postaj jaroj li rakontis al siaj disĉiploj, ke la tuta manĝaĵo, kiun li prenis tie, konsistis nur el la rosoj falintaj de la arbofolioj⁵⁾.



Onisabro Deguči (1871-1948)

Estis tiam kaj tie, ke okazis al li sinsekvo da mistikaĵoj, pri kio oni nun povas legi en la 81 volumoj de *Rakontoj el la Spirita Mondo*, kiujn li verkis poste. La revelacio, kiun li ricevis sur la monto, estis, ke li estis destinita kiel la servanto de Dio por veki la socion kaj proklami la veran vojon de la Dio en "la lastaj tagoj de la Leĝo". Reveninte hejmen de la monto, li havis en sia koro jam firman konvinkon pri sia misio por mondsavado. Tamen, eĉ tiam li ankoraŭ ne konis la nomon de la Dio, kiu manifestis Sin al li. Notinda estas la fakto, ke liaj religiaj spertoj sur Monto Takakuma okazis ses monatojn antaŭ ol li unuafoje vidis la Fondintinon Nao Deguči.

⁵⁾ Laŭ la doktrino de Konko-kjo, "Uŝitora no Konjin (Ora Dio en Nord-oriento)" estas la Dio kiu manifestiĝis al la fondinto de tiu sekto, kaj la nomo de ĉi tiu Dio estas trovebla en neniu ŝintoisma kroniko. Laŭ la doktrino de Oomoto, tiu ĉi Dio tamen estas identigita kun "Kuni Toko Taĉi no Kami (la Kreinto-Dio de la Universo)", kies nomo estas trovebla en la *Kojiki* (La Kroniko de Malnovaĵoj) kaj la *Nihongi* (La Japana Kroniko). En tiu ĉi punkto de la identigado de Dio, Konko-kjo kaj Oomoto tute diferencas unu de la alia.

Mi resumos la postan rakonton. Unu tagon Kisabro hazarde legis kelkajn kajerojn de la "Ofudesaki", kiun la Fondintino skribis. Leginte ilin li estis treege surprizita trovi ke la revelacio, kiun li iam ricevis de nekonata Dio, estas en sia esenco tute simila al tio, kio estas skribita en la *Ofudesaki*. Kaj tiu simileco decidigis lin, ke li renkontiĝu kun Nao. Tiu ĉi tiutempe estis aliĝinta al la ŝintoisma sekto Konko-kjo kaj laboranta sub instruanto de tiu sekto. Sed, Nao ekrimarkis, ke, malgraŭ ke la nomo de la Dio, kiu Sin manifestis al ŝi, estas la sama al tiu de Konko-kjo, la diversaj revelacioj, kiujn ŝi estis ricevintaj, estas tute malsamaj ol la instruoj rivelitaj al la fondinto de Konko-kjo. Ŝi do demandis al si, ĉu ŝia Dio povus esti malsama ol la Dio de Konko-kjo⁵⁾. Tio okazis en tiu tempo, kiam ŝi renkontis Kisabro Ueda, kiu promesis ke li helpos ŝin por propagandi la unikan revelacion. Post kelkaj jaroj li eniris la familion de Deguči kiel adoptita filo, kaj edziĝis al la plej juna filino de la Fondintino. Kisabro Ueda do ŝanĝis la nomon je Onisabro Deguči, kaj ne sole fariĝis la kunlaboranto de la Fondintino, sed ankaŭ asistis sin per interpretado pri la *Ofudesaki*, sistemigado kaj riĉigado de la doktrinoj. Li ankaŭ organizis Oomoton kiel religian grupon, kaj faris grandan kontribuon por la estonta disvolviĝo de la movado. Sen troigo oni povas diri, ke sen Onisabro Deguči la religiaj spertoj

⁴⁾ Vd. *Reikai Monogatari* (La Rakontoj el la Spirita Mondo), Vol. I, Parto 1, Ĉap. 24, paĝoj 75-78.

de la Fondintino kaj la revelacio donita al ŝi neniel povus esti evoluinta ĝis la hodiaŭa formo de Oomoto. Nao kaj Onisabro spirite unuiĝintaj starigis plej influhavan religian organizon. Nature estas, ke Nao estas respektata kiel "Kaiso" la Fondintino kaj Onisabro kiel "Seiŝi" la Sankta Gvidanto.

(4)

Oomoto kiel novreligio estis persekutata de la Meiji-registaro, samkiel ankaŭ de la malnov-religiaj tendaroj kaj metiĝis en tre malfacila situacio. Onisabro mem devis suferi ankaŭ pro la antagonisma forto direktita al li de la tiutempaj gvidantaj personoj de Oomoto, kiuj ĵaluzis je lia sukcesa mano. Kiel organizanto de Oomoto li havis multajn pezajn zorgojn interne kaj ekstere. La Fondintino siaflanke daŭrigis la skribadon de Diaj vortoj, kaj pro tio ŝi bezonadis grandan kvanton da paperfolioj. Ŝiaj piaj sekvantoj do devis nokte okupi sin en kromlaboro por gajni ekstran monon por la papero. Dume, japana socio pli kaj pli rapide metamorfozis kiel kapitalisma nacio. Onisabro atentigas sin pri la pli kaj pli akriĝantaj sociaj problemoj kaj ĉiam pli firme konfirmas sian gravan mision por la socio. La jenaj linioj el lia verkaĵo spegulas lian korstaton:

Armado kaj milito estas la rimedoj, per kiuj profitas nur la bienuloj kaj kapitalistoj, sed la malriĉuloj ĉiam devas suferi pro ili. En la mondo nenio estas pli malbona ol milito, kaj nenio estas pli malsaga ol armado⁶⁾.

La skribaĵoj de Onisabro sciigas nin,

ke li havis konvinkon ke Japanujo estas destinita spirite regi la mondon, kaj klopodis starigi la spiriton de universala frateco kun tiuj, kiuj respondis al lia ideo de "Mondfamilio". Unue li fondis intiman rilaton kun la Ruĝ-Svastika Asocio en Ĉinujo. Poste li iris al Pekino, kie li okazigis la unuan internacian religian konferencon kun partopreno de reprezentantoj el la ĵus nomita Asocio, Tao Juan, Caili, Hui, Islamo, Lamaismo kaj aliaj.

*

Pro manko de spaco mi ne povas priskribi detale, pro kio Oomoto devis trasperti dufojn persekutojn de la japana registaro⁷⁾. Ĉi tie sufiĉas nur diri objektive, ke la akuzoj, per kiuj la registaro subpremendis Oomoton, estis nur fabrikaĵo elfarita de l' registaro kaj de la malnovaj religioj, kiuj timis antaŭ la rapida disvastiĝo de la Oomoto-movado. Ankaŭ la tiama ĵurnalismo nur flatis al la legantaro kaj publikigadis fabelajn kaj sensaciajn artikolojn kontraŭ Oomoto. Tiuj fantaziaj "raportoj" elknedis falsajn kvazaŭ veraĵojn ke Onisabro konspiris por renversi la registaron, kaj ke sennombraj bomboj, 100,000 bambulancoj kaj dinamitoj estis malkaŝitaj el la tenejo de Oomoto. Alia famo diskuris, ke Onisabro seksperfortis nombron da virinaj piuloj kaj kelkaj el ili, kiuj malobeis lin, estis mortigitaj. Ĉi tiuj skandalaj "novaĵoj" plenigis la tiutempajn ĵurnalojn. Dum la polico povis trovi neniun atestojn por pruvi la verecon de la famoj, Onisabro jam estis persekutata pro *lèse majesté* (malrespekto al la majesteco) kaj la malobeo al Pres-

Kodo.

Malgraŭ la unua subpremado de la registaro, la nombro de la Oomoto-kredantoj ĉiam pli kaj pli grandiĝis, kaj la eldonnombro de dektaga ĵurnalo de Oomoto fine atingis unu milionon. Tiu ĉi fakto sendube montras, ke la influo de Oomoto en la japana socio jam neniam devas esti ignorata. Ĉi tiu mirinda kreskado de Oomoto per ĵurnalismo fariĝis minaco por ĉiuj aliaj ĵurnaloj de komercaj entreprenoj kaj alarmo denove por la registaro. Konstatinte ke la unua subpremo ne estis sukcesa, la registaro planis la duan persekuton laŭ pli granda skalo ol antaŭe, kaj aŭtoritatoj intencis elradike ekstermi Oomoton el la japana socio. Estis en la frua mateno de l' 8-a de dec. 1935, kiam kelkaj centoj da armitaj policanoj alveturis sekrete en kvardek aŭtobusoj kaj atakis la Oomoto-centrojn en Ajabe kaj Kameoka. Samtempe ĉiuj lokaj centroj kaj filioj de Oomoto estis priserĉitaj kaj granda nombro da lokaj gvidantoj kaj kredantoj arestiĝis. Onisabro estis kondamnita unue al morto, sed poste, al ĝismorta punlaboro. Isao Deguĉi, kiu tiam estis afera administranto, kondamniĝis je dekkvin-jara punlaboro⁸⁾. Ĉiuj domkonstruaĵoj kaj instalaĵoj ĉe la centroj estis detruitaj, kelkaj el kiuj per dinamitoj. Multaj



Supra: La "Luna Sanktejo" el ŝtonoj konstruita ĉe la altaĵo de la Oomoto-Centro, Kameoka, laŭ la desegno de Onisabro, kaj dediĉita de la tuta kredantaro de Oomoto en 1928.

Malsupra: La sama sanktejo detruata pe dinamitoj, 1936.

proprietaĵoj kaj eĉ montrotabuloj estis forbruligitaj. La registaro dekretis la plenan malorganizon al Oomoto. Tiel Oomoto ŝajnis entute nuligita. La veron de iu kredo oni povas pruvi kaj mezuri per tio, kiel la kredantoj vere povas elteni terurajn persekutojn. Oomoto ja estis metita ĝuste en tia situacio.

La "rekonstruo" de la mondo, kiun

⁸⁾ Onisabro kaj Isao en fakto liberiĝis per kaŭcio la 7-an de aŭg. 1942, t. e. ses jarojn kaj ok monatojn post sia arestiĝo.

⁶⁾ *Miti no Siori* (Gvidilo al la Dia Vojo), 1925.

⁷⁾ La interesato sin turnu, i. a. al "La Oomoto-kjo" de prof. Umehao, n-ro Marta, 1960 de *Chuo Koron*. (Vd. la frontartikolon de OOMOTO, N-ro majo-junio, 1960).

Oomoto vidata de Kristano

En la revuo "Oomoto" de Julio-Aŭgusto 1960 aperas la unua parto de grava artikolo de eminenta kristana profesoro, S-ro Sakae Kobajaŝi, pri la naskiĝo de la japana religia movado Oomoto.

Menciinte la komencon de la misio de Sinjorino Nao Deguĉi, la klera Aŭtoro demandas nin, ĉu la apero de Forta Spirita Estulo al ŝi, nomante sin mem "La Ora Dio en la Nordoriento", donante al ŝi difinitan taskon kaj poste igante ŝin skribi, ne rememorigas nin pri Jeremia 1: 6-10 kaj Jesaja 6: 3-5, ĉar ŝi, simile al tiuj profetoj, timas la mision pro sia persona nekapableco.

Kiel antipodano de la klera Aŭtoro, mi petas permeson por respondi. Jes, certe; sed ne nur tiujn profetojn. Tiu fakto rememorigas nin pri la tuta Biblio, pri la fundamento mem de Judismo kaj Kristanismo, kiuj baziĝas sur similaj aperoj de Dioj, Anĝeloj, Spiritoj. La nomoj Dioj, Anĝeloj, Spiritoj tra la jarmiloj ŝanĝis la signifon, ĉar ili ne

estis klare difinitaj por la antikvuloj aŭ por malkleraj popolanoj kiel Sinjorino Nao Deguĉi.

Laŭ "Eliro", ĉapitroj 3 kaj 4, aperis al Moseo, en la monto Ĥoreb, anĝelo kaj alparolis lin "la Dio de Abraham, la Dio de Isaak, kaj la Dio de Jakob" (Eliro 3:6). Moseo ankaŭ timis pro sia nekapableco kaj diris: "Kiu mi estas, ke mi iru al Faraono kaj mi elkonduku la izraelidojn el Egiptujo?" (Eliro 3-11). "Ho, mia Sinjoro, mi ne estas elokventa ... mi havas nelertan buŝon kaj nelertan langon" (Eliro 4:10). Lia disĉutado kun la Dio de la Izraelidoj estis longa, tute simila al tiu de Sinjorino Nao Deguĉi kun la "Nordorienta Dio"; sed fine li devis obei kaj ricevis La Dek Ordonojn (Readmono 5: 6-21) kaj la tutan doktrinon de Judismo.

Tra la jarcentoj la profetoj de Izrael ricevis plurajn similajn misiojn, kiuj plenigas la Malnovan Testamenton.

La Nova Testamento komenciĝas ankaŭ per similaj aperoj kaj timoj.

Nao kaj Onisabro antaŭdiris, iusence faris sian unuan paŝon de efektiviĝo kiam malvenkis Japanujo en 1945. La malvenko finigis la militon. Tio estis la 8-a de dec., la fatala tago por la lando. Kaj tiu dato koincidis kun la tago, en kiu la dua "Oomoto-afero" okazis antaŭ ses jaroj. Por la kredantoj de Oomoto la dato "la 8-a de dec." povas esti evidenta atesto pri la efektiviĝo de Dia plano por Japanujo kaj por la mondo, ĉar kia ruino al Oomoto, tia ruino okazis al Japanujo. Ne mirinde ke la malnovaj oomotanoj revenis al sia sankta loko kun plifirmigita kredo, tuj kiam la reorganizado de Oomoto estis anoncita. Oomoto tiel

renaskiĝis el ruinaĵo kiel Fenikso el la cindroj. En la postmilita ĥaoso, kiam la japanoj ankoraŭ estis suferantaj pro manko de nutraĵoj, vestaĵoj kaj loĝejoj, okazis la rapida rekonstruado de Oomoto kaj tio certe estis miraklo. Oni diras, ke preskaŭ naŭdek elcentoj de la kredantaro post la severa persekutado revenis al la rekonstruita Oomoto. La domrekonstruado ĉe la Centroj en Ajabe kaj Kameoka estis farita per volonta laboro kaj servo de la kredantoj. La gvidanteco de Oomoto estis transdonita al Hidemaru Deguĉi, bofilo de Onisabro. Sed, li estis perdinta sian sanon en karcero pro torturado dum la milito, kaj li ne povis

Anĝelo aperas al Zeĥarja kaj anoncas la naskiĝon de Johano la Baptisto, laŭ Luko 1: 11-20, sed Zeĥarja maltrankviliĝis, timis kaj demandis: "Per kio mi scios tion? ĉar mi estas maljunulo, kaj mia edzino havas profundan aĝon?" (Luko 1: 18).

Anĝelo aperas en Nazaret al Maria kaj anoncas la naskiĝon de Jesuo Kristo, laŭ raporto de Luko 1: 26-37, sed ŝi timas kaj demandas: "Kiel estos tio, ĉar mi ne konas viron?" (Luko 1: 34).

Al Jesuo ne aperis iu Dio aŭ Anĝelo, sed du eminentaj mortintaj Izraelidoj de antaŭaj jarcentoj, nome Moseo kaj Elija, kiel ni legas en la priskriboj de Mateo 17: 1-5, kaj Marko 9: 2-5. Antaŭ la apostoloj Petro, Jakob kaj Johano tiuj eminentaj Spiritoj interparolis kun la Sinjoro, kiu en tiu momento estis "aliformita antaŭ ili; kaj liaj vestoj fariĝis brilantaj, treege blankaj, kiel fulisto sur la tero ne povas blankigi" (Marko, 9:2-3).

La naskiĝo de Oomoto estas do tute simila al la plej respektindaj religioj de Okcidento ĉe iliaj formiĝoj.

Tre granda simileco ankaŭ estas pro

esti respondeca por la aktuala laboro. Isao Deguĉi, edzo de la tria filino de Onisabro, do prenis sur sin la respondecon por la reorganizado. Onisabro mem ankaŭ okupis sin en la direktado de la rekonstrua laboro. La finiĝo de la surtera vivo de tiu ĉi heroo tamen estis proksimiĝanta. En la mezo de sia aktivado por la rekonstruado Onisabro mortis en januaro de 1948.

(Daŭrigota)

persekutado.

La plej ĉarma profeto de Izrael, nome Jesaja, estis martiro: lian korpon vivantan la persekutantoj segis malrapide per ligna segilo, ke lia morto estu plej dolora. Jesuon oni publike skurĝis kaj krucumis. Liajn disĉiplojn oni enkarcerigis, turmentis, mortigis. La plej fervorajn kredantojn oni ĵetis en la roma cirko al sovaĝaj bestoj. Sed persekutado religia montras malpravecon nur de la persekutantoj, ne de la persekutatoj.

Persekutado kaj suferoj estas utilaj por elmontri la sincerecon de la kredantoj. Nur la persekutado eternigas la religion. La judoj estas persekutataj tra la jarmiloj, tial ili estas nevenkeblaj.

La Oomotanoj jam venkis tiun necesan provon kaj tial ilia movado akiris senmortecon. Ili disvastiĝas tra la mondo. Ili predikas univarsalan homamon kaj estas estimataj ĉie.

Mi ne konas la tutan tezon de Sinjoro Sakae Kobajaŝi, sed mi esperas, ke li finos ĝin konsilante la kristanojn respekti kaj ami la Oomotanojn.

Iĥmael Gomes Braga,
Rio de Janeiro



La Oomoto-Centro de Ajabe, vidata de trans la rivero Uaĉi

La 47-a Japana Esperanto-Kongreso en Maebaŝi

Decidis inviti la 50-an Universalan
Kongreson en 1965 al Japanujo

La 47-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis 20-22 aŭg. 1960 en Maebaŝi cent kilometrojn nordokcidente for de Tokio. Maebaŝi estas provinca urbo de kulturo kiel la sidejo de la gubernia oficejo de Gunma-prefektujo. La okazigo de la kongreso tie ŝuldis ĉefe al la aktiveco de d-ro Seiho Niŝi, rektoro de Gunma Universitato kaj prezidanto de Japana Esp. Instituto (JEI). Sub lia influo, en la universitato troviĝas kelkaj esperantistoj-profesoroj, kiuj ĉi-foje aranĝis la kongreson kaj kiujn oni nomis prezidantoj de la kongreso. D-ro Niŝi estis elektita la honora prezidanto de la kongreso.

La ĉi-jara kongreso estis grava precipe, ĉar ĝi havis proponon pri la invito de la Universala Kongreso en 1965 al Japanujo (al kio mi revenos poste).

Mi unue faros resuman raporton de

la kongreso laŭ ĝia tagordo.

Unua tago

Vespere je la 6-a, okazis en studĉambro de la Gunma Universitato la antaŭkongresa kunveno, kie oni faris diskutadon pri la plenum-maniero de la kongreso kaj poste la ĝeneralan kunvenon de JEI. Ĝin partoprenis proks. cent personoj. Ĉiuj ĉeestintoj kaj 'moralaj' partoprenintoj ricevis la kongreslibron, memoraĵojn kaj libreton "La Turo de Londono" de Sooseki Nacume, esp-igitan de d-ro S. Niŝi.

Dua tago

Je la 11-a malfermiĝis la kongreso en la Halo de Komerca-Industria Domo de la urbo. Ĉar la radioj kaj ĵurnaloj alarmis pri la ebla surteriĝo de tajfuno n-ro 15 en Kantoo Distrikto inter la unua kaj la dua kongrestagoj, la aranĝantoj estis maltrankvilaj pri la nombro de la ĉeestintoj. Sed la dua tago feliĉe fariĝis serena post la forpaso de la tajfuno. Partoprenis proks. ducent personoj el tricent kelkaj dekoj da aliĝintoj, kio estis sukcesa el la vidpunkto de la situo de la urbo.

Post la bonveniga saluto de la honora prezidanto S. Niŝi sinsekvis la salutoj de s-ro G. Kanda, guberniestro,

kaj s-ro Iŝii, urbestro de Maebaŝi. La guberniestro, kiu iam lernis nian lingvon en sia juneco, bone komprenis la mision de esp-istoj kaj gratulis la okazigon de la kongreso en Maebaŝi. La urbestro akcentis la gravecon de la pacmovado de esp-istoj precipe en la nuna tempo, kiam la pacmovadoj en Japanujo ĝenerale tendencas esti envolvitaj en ŝtatpolitikaj komplikajoj.

La Jagi-stipendio estis donita al d-ro Joŝihiro Jasumura, asistant-profesoro de Ĉiba Universitato, pro lia disertacio verkita en esp-o pri Kontinua Kulturado de la Ĉeloj de Musa Fruktoza Sarkomo en Vitro, kiun oni publikigos en la periodaĵo de Japana Kancera Asocio. Por la Oŝaka-premio kaj la Morijama-stipendio, ĉi-jare, mankis kandidatoj rekomendindaj.

Poste la kongresanoj aŭskultis la paroladon de s-ro E. Ito, oomotano-esperantisto, sub la titolo "Rememoroj pri la Jubilea Universala Kongreso en Varsovio". En sia parolado li tamen evitis fari raportojn de oficiala karaktero,


ĉar la plejparto de la ĉeestantaro jam legis la pli-malpli detalajn raportojn en diversaj esp-aj gazetoj. Lia parolado do temis ĉefe pri la personaj impresoj kaj spertoj de lia rondvojaĝo tra Eŭropo kaj Usono: pri esp-movadoj en diversaj landoj kaj pri lia gastigo en la esp-istaj hejmoj, precipe en kiuj la familianoj praktikas esp-on en sia vivo. Lia humurplena facile komprenebla parolado en esp-o donis al la publiko grandan impreson kaj ĝuon.

Post la komuna fotografiĝo en la halo la kongresanaro ripozis por tagmanĝo.


Laborkursido

La posttagmezo estis dediĉata por la Laborkursido.

Sinsekvis raportoj pri la ĝenerala aktiveco de esp-istoj en distriktoj kaj poste pri lokaj kaj fakaj organizaĵoj. Ĝenerale dirite ne estis specialaĵoj menciindaj; la movadoj tra la lando aspektis iom stagnadaj. Sekvis la diskuto




S-ro E. Ito parolanta antaŭ la ĉeestantaro en la dua tago



pri la proponoj.

La unua propono estis: Ni decidu inviti al Tokio la 50-an Universalan Kongreson en 1965. D-ro H. Jagi reprezentante la enket-komitaton por la invito de U. K., fondita en la lastjara kongreso, klarigis ke la komitato post duonjara studado estas konvinkita, ke troviĝas la eblecoj por tio. Post li, kelkaj samideanoj laŭpete donis necesajn klarigojn pri la karaktero kaj regularo de la U. K. Enirinte la diskuton, la plej multaj subtenis la proponon. Aperis nur unu aŭ du nefavoraj opinioj, laŭ kiuj la japanaj esp-istoj kvalite ankoraŭ estas iom tro junaj por fari la inviton. La propono estis aprobita de la plejparto de la ĉeestantoj. Sekve, s-ro K. Macumoto, prez. de Tokia Esp-Klubo, deklaris ke por tiu ĉi afero li estas preta preni sur sin la taskon de kontaktado kun UEA, kondiĉe ke la japana esp-istaro subtenos lin. Jen estis la momento, en kiu la japanaj



Lago Oonuma kaj Mt. Kurobi (1828 m), unu el Akagi Montaro



La pensio en Akagi-montaro apud la lago Oonuma

esp-istoj faris historian novan paŝon. Ili de nun ĉiam pli strebos kvalite kaj kvante progresigi la esp-istojn en nia lando, prepare al la Kongreso en Japanujo.

La dua prop. estis: Ni starigu planon pri la longperioda organiza agado de esp-istoj, proponita de Esp-a Seminario de Centra Laborista Instituto. S-ro Saburo Ito post sia klarigo prezentis siajn enhavoriĉajn ideojn kaj sugestojn por la kontaktado inter esp-istoj kaj ne-esp-istaj organizaĵoj, ekz. Unesko, lokaj bibliotekoj kaj aliaj. Li atendis multajn aliajn opiniojn. Tamen por tio jam mankis la tempo kaj pro la karaktero de la problemo mem oni lasis al ĉiuj la pristudon ĝis la venontjara kongreso.

La tria temis pri loko de la venontjara kongreso. Estis neniuj proponintoj. Tio signifas, ke la afero estas lasita en la manoj de JEI. Se ne troviĝas la propononto, la kongreso laŭregule okazas en Tokio.

Paralele kun la laborkunsido okazis en aparta ĉambro la regulaj Ekzamenoj de Esperantistoj, elementa kaj supera, sub la aranĝo de JEI.

Vespera Kunveno en Akagi-montaro

Je la 5-a posttagmeze la plimulto de la ĉeestantaro aŭtobuse kuris al la tria

kunvenejo en Akagi-montaro. Post du-onhora kurado norden de Maebaŝi la tri busoj jam atingis la malsupron de la Montoj. De tie la vojo zigzage supreniris. La busoj malrapide serpentumis dekstren kaj maldekstren. Oni ĝuis la belegan pejzaĝon kun la montsuproj brilantaj per la subiranta suno. Baldaŭ poste la busoj komencis malsuprenkuri. Kaj sub la okuloj videbliĝis la blua lago tra la blankaj betuloj. Trans la lago estis vidata unu konstruaĵo, kiu aspektis kvazaŭ kastelo en mezepoka Eŭropo. Oni diris ke ĝi estas nia tria kunvenejo, la pensio en Akagi-montaro, apartenanta al la ŝtataj universitatoj en Kantoo Distrikto kaj la najbaraj provincoj. Akagi-montaro antikve estis vulkana. Nun ĝi estas kvietaj kaj belega loko.

Je la 8-a la vespera kunveno komenciĝis per la parolado de d-ro S. Niŝi pri "Tagiĝo de la Eŭropa Kulturo en Japanujo". Temis pri la japana historio de anatomio. Pro la prokrastita komenciĝo de la kunveno li devis mallongigis sian paroladon.

Dum la "Amuza Horo" la membroj de Studa Rondo de Esp-Teatro en Tokio prezentis esp-an teatraĵon "La unua



La fakkunsido de MEM. De maldekstre la dua estas s-ro S. Ito kaj la tria s-ro N. Esumi.

paŝo al estonteco". Ĝi estis tendenca dramo de laboristoj. Ĉiuj ludantoj ludis kun teksto en mano pro manko de ekzerciĝo, sed iliaj entuziasmo kaj seriozezo sukcesis kaŭzi emocion.

Tria Tago

Antaŭtagmeze okazis en la izolita pensio la fakkunsidoj, por kiuj ĉiu ĉambro devis esti uzata de po du grupoj unu post la alia pro manko de lokoj. La kunsidoj estis studenta, edukista, sciencista, UEA-a, SAT-a, medicina, virina, junulara, literatura, MEM-a, kristana, altlerneja kaj laborista.

Post la tagmanĝo, oni aŭskultis la raportojn pri la ĵus pasintaj fakkunsidoj. Unuvorte al ili mankis rezolucioj por konkreta laboro. La fakkunsidoj de Junularo kaj de UEA havis plej multajn partoprenintojn respektive je nombro de pli ol kvardek personoj, kaj la literatura decidis akceli la laboron por Japana Antologio.

Ĉe la finiĝo de la raportoj, s-ro Saburo Ito esprimis sian bedaŭron pri la neprogreseco en la Esp-lernado de la junuloj kaj studentoj. Tio estigis ĉe kelkaj alian demandon: kiamaniere la

japanaj esp-istoj devas altigi sian kvaliton? Oni devis rekoni la gravan necesecon de organiza agado kaj individuaj seninterrompa studado.

Je la dua la kongreso fermiĝis per la kantado de "La Tagiĝo". La plejmultaj ekmarŝis al la malsupro de la monto Ĵizodake (1,674 m. alta) por atingi ĝian supron per kablovagono kaj ĝui la belegan panoramon.

N. Esumi

Allan Kardec

(2)

Mi petas, ke la leganto pardonos min pro tiuj ĉi flankiĝoj de nia ĉeftemo. Ni nun revenu al Sinjoro Rivail, aŭ pli bone, al Allan Kardec.

La unua grava konkludo, kiun Allan Kardec tiam atingis en la komenco de sia esploro estis, ke la scio de iu spirito estas limigita al ties evolugrado. La dua estis, ke ĉiu spirito nur donas partan bildon de tio, kion li nomus sia medio en la transtomba mondo. Li neniam povas rakonti ĉion, nek klarigi ĉion. Li scias nenion pri aliaj kondiĉoj ol sia propra. Tial, por ke vi lernu iom pli pri la alia flanko de vivo, vi devas demandi multajn spiritojn, kompari iliajn informojn kaj decidi pri ilia graveco kaj valoro. Cetere, kion ili raportas, tio estas nur tio, kion ili mem travivis; ili ne estas antaŭdestinitaj fari specialan specon de revelacio. La leganto povas trovi ĉiujn ĉi konsiderindajn aferojn en la libroj de Kardec, precipe en liaj "post-mortaj verkoj".

En la komenco li ne estis tro entuziasma pri siaj trovaĵoj. Li havis aliajn aferojn por fari kaj li estus probable forlasinta la tutan aferon, se ne ekzistus la insistero de liaj amikoj, Carlotti, Taillandier (de la Akademio de Sciencoj), Tiedman-Manthesse, Sardou (patro kaj filo) kaj Dillier, la eldonisto. Tiu ĉi grupo de alte kompetentaj viroj estis akirinta teruran amason da informoj pere de mediuma laboro, kiuj plenigis 50 kopi-librojn. La grupanoj tre bone konis

S-ron Rivail, lian prudentan juĝkapablon, lian klerecon kaj lian kapablon de sintezado. Kiaj ili estis, la informoj kolektitaj estis preskaŭ senutilaj. Iu bezonis ordigi ilin kaj el ili ekstrakti la tutan oron, kiun ili en si certe entenis. La viro por fari tiun taskon estis neniu alia ol S-ro Rivail. Tial la 50 kopi-libroj estis transdonitaj al li por studado kaj kritikado. Sed li lasis tion por kelka tempo. La tasko estis teda kaj temporaba, kaj li havis multajn aliajn aferojn por fari en sia okupoprema vivo.

Unu nokton, spirito anoncis pere de mediumo, ke li estis amiko de S-ro Rivail en antaŭa ekzistado, inter la druidoj (pastroj) de Gaŭlo. Tiu amika spirito diris, ke en tiu antaŭa tempo S-ro Rivail estis nomata Allan Kardec, kaj ke nun S-ro Kardec ekhavas gravan taskon antaŭ si kaj li povos facile preni ĝin sur sin kaj elfari ĝin kun supera rezulto. La spirito helpus lin traporti la ŝarĝon de tasko.

S-ro Rivail do decidis tralegi la tutan manuskripton atente, eliminis ripetaĵojn, prinotis la mankojn por esti plenigitaj kaj la nebulaĵojn por esti klarigitaj. Poste, li preparis la demandojn, kiujn li devis fari al la spiritoj.

Ĉar la seancoj ĉe la hejmo de ges-roj Baudin ne havis specifan celon, S-ro Rivail decidis solvi la problemojn, kiuj interesis lin el la vidpunktoj de filozofio, psikologio kaj la naturo de la nevidebla mondo. Ĉe ĉiu seanco li kutimis ĉeesti kun aro da antaŭarangitaj demandoj kaj ĉi tiuj estis precize kaj logike respond-

itaj. Tio ĉi faris turnopunkton. La seancoj de tiam alprenis al si seriozan formon, dum la spiritoj de alta moraleco pacience respondis la demandojn de S-ro Rivail.

Li diradis poste, ke la respondoj, kiujn li serĉis, estis por lia propra klerigado. Tamen, kun la paso de tempo li rimarkis, ke la tuta afero montris en si la formigon kaj disvolviĝon de doktrinaro. Li tiam ekhavis la ideon ĝin publikigi por la instruado al aliaj homoj, kiuj estus interesitaj en tiu absorba temo. Tiuj ĉi demandoj, sufiĉe ordigitaj kaj kompletigitaj, poste fariĝis la bazo de granda libro, kiun li nomis "La Libro de la Spiritoj".

Post kiam la trastudo estis kompleta, S-ro Rivail submetis ĝin al la spiritoj pere de alia mediumo, F-ino Japhet. Tio ĉi estis plenumata en publikaj seancoj, kaj poste, laŭ la admono de la spiritoj, en privataj seancoj. La verkaĵo estis atente kontrolita kaj revuita kun granda peno. Eĉ tiel, S-ro Rivail ne estis kontenta. Li submetis la verkaĵon al pli ol dek mediumoj, ĉar li estis singardema pri tiuj delikataj demandoj, super kiuj li ripete enketis. La tuta verko poste estis re-ekzamenita de S-ro Rivail, kiu komparis notojn kaj klasifikis la informojn. El la silentado de multaj meditataj horoj, kaj tagoj, li fine publike aperis kun la "La Libro de la Spiritoj", kiu eldoniĝis la 18-an de aprilo 1857. Por eviti miskomprenon, kiu povus okazi en la estonteco de la libro, S-ro Rivail decidis publikigi ĝin sub la nomo de Allan Kardec, kiun, laŭ lia spirita amiko kaj gvidanto, li uzis en antaŭa vivo inter la druidoj.

La unua eldono de tiu ĉi rimarkinda libro estis surpriza sukceso. En 1858 la dua eldono aperis. Li ricevadis leterojn kaj informojn de ĉie kaj de ĉiu. Li devis

fari ion por atingi ĉiujn homojn, kiuj skribis al li, faris demandojn, petis konsilojn kaj faris sugestojn kaj kritikaĵojn. Li sentis, ke ĵurnalo devas esti eldonita. Por plenumi tiun breĉon, la "Revue Spirite" aperis la 1-an de januaro 1858.

Tamen la pli malfacila parto de lia misio ankoraŭ estis venonta. Ŝajnis kvazaŭ la ĉielo falis sur lian kapon. Li estis kalumniata, malamata kaj persekutata kiel publika malamiko. Oni distordis liajn instruojn, kaj multaj el tiuj, kiujn li servis aŭ helpis, ektenis sin kontraŭ li. Multajn fojojn li sentis tion ne plu eltenebla. Lia sano malboniĝis pli ol unu fojon, sed iel li sukcesis daŭrigi sian laboron kaj esploron pri la problemoj de la Spiritismo. Li laboris ĉiam pli energie, ne plu donante gravan atenton al tio, kion liaj malamikoj diradis aŭ faradis kontraŭ li. El la spirita mondo li estis admonita, ke li travivu ĉion tutan.

En januaro de 1861 alia libro aperis. Ĝi estis "La Libro de la Mediumoj", verko kiu devis tradukiĝi en multajn

Jasuo Sakurai:

Dek Gvidprincipoj de la Oomoto-Movado

25-paĝa broŝuro (15×21 cm).
Prezo: 2 rpk.

Anglalingva eldono de la sama
broŝuro estas havebla por la
sama prezo.

La Redakcio

ingvojn por ke bona trejna programo por mediumoj estu universale starigita surbaze de la normoj disvolvitaj de Kardec.

Ĝis tiu tempo la verkoj kaj artikoloj de Kardec estis gajnintaj vastan rekonon en Francujo kaj ekstere de tiu lando. En 1861 okazis, ke en Barcelono, Hispanujo, la Inkvizicio bruligis 300 librojn kaj gazetojn pri Spiritismo. La du jam eldonitaj libroj de Kardec okupis ĉeflokon en la stako, kiu flamigis la rubfajron. Kardec pensis, ke li devas agi tra diplomaciaj vojoj, ĉar la libroj estis enirintaj en Hispanujon laŭleĝe kaj la registaro ne redonis ilin nek repagis la impostojn pagitajn pro ili. La spiritoj tamen admonis lin alimaniere: la ridinda kaj monstra procedo iru laŭ sia propra vojo. Tiom pli bone por la propagando de la ideoj, kiujn la libroj entenis, ili diris. Kaj ili estis pravaj.

Dume, Kardec vojaĝis vaste, okazigis kunvenojn, verkis multajn artikolojn, respondis leterojn, eldonis novajn librojn, en la mezo de pezaj kaj lacigaj rutinoj por i. a. mastrumi laŭ ĝia destino la Spirit-Societon fonditan en 1858.

En 1869 la Societo transformiĝis en korporacion kun la kapitalo de 40,000 frankoj. Ĝia celo estis la publikigado de la "Revue Spirite" kaj libroj de Kardec. La nova organizaĵo estis oficiale starigita la 1-an de aprilo 1869. Allan Kardec estis pretiganta sin por translokiĝi al pli oportuna kvartalo, kiam — la 31-an de marto 1869 — lia koro subite ĉesis batadon kaj li forpasis en la pli altan vivon. Tiam li estis 65-jara.

Lia korpo nun ripozas en Tombejo Père Lechaise, Parizo, kien liaj disĉiploj el la tuta mondo vizitas unu fojon ĉiujare. Ili estas milion-nombraj.

Lia vivo kaj liaj luktoj estas kroniko, kiu rakontas la sorton de ĉiu, kiu havis

novan mesaĝon por disdoni kaj kiu estis dotita per la kuraĝo eldiri ĝin kaj elteni la konsekvencojn. La doktrino, kiun li klopodis kodigi, nun estas disvastigata tra la mondo kaj liaj libroj estas tradukitaj en multajn lingvojn por atingi ĉiam pli kaj pli kreskantan rondon da legantoj.

Li tenadis, kune kun sia strikte scienca rezonado, la fajron de profunda kredo en Dio, kaj vivis laŭ la principoj de kristana amo en la plej pura kaj senmakula formo. Li ne nur predikis, sed agadis laŭ sia moto: "Nenia savo estas ebla ekster amo".

Neniu povas aserti sen scii liajn verkojn, ke li havas plenan komprenon pri la vera signifo de Spiritismo. Kiam vi legas la librojn de Kardec vi trovas, ke ne eĉ unu vorto povas esti ŝanĝita, forstrekita aŭ aldonita. Ĉiu vorto, kiun li diras aŭ igas aliajn diri, estas provita de lia komuna saĝo, lia inteligento kaj lia scienca scio. Li diris nenion pri kio li ne estis certa. "Spiritismo estos scienca, aŭ ĝi estos nenio", li iam diris.

De kiam lia unua libro aperis, unu plena jarcento forpasis. Scienco faris grandegan progreson kaj atingis ĉiun angulon de la universo, de la atomo ĝis la steloj. Multaj el la problemoj pritrakitaj de Kardec poste estis pli ampleksigitaj kaj enfokusitaj per novaj lumoj, sed la fundamenta vero, kiun ili entenas, ankoraŭ restas netuŝita de la scienca progreso. Tamen, multon el tio, kion Kardec diris, jam konfirmis scienco. Tiuj kiuj sekvas la ideojn de Kardec fidas pri sia estonteco; ili gardas Veron kaj Vero ne timas la provadon de la tempo.

Fino. Trad. D. R.

KOREKTO: La vivlongo de Allan Kardec, montrita sub lia portreto en la antaŭa numero (p. 107) devas esti korektita kiel: 1804-1869. La Trad.

Petro Dănov

Amo, Saĝo, Vero

Ekzistas tri grandaj principoj: de la Amo, de la Saĝo kaj de la Vero. La amo naskas la vivon, la saĝo portas la lumon, la vero donas liberon. Ili devas fariĝi fundamento de via vivo por esti racia homo. La amo manifestiĝas per la sentoj, la saĝo — per la pensoj kaj la vero — per la agoj.

Homo devas serĉi la amon, ĉar ĝi portas vivon kaj purecon. Li devas serĉi la saĝon, ĉar ĝi portas lumon kaj scion. Homo devas serĉi ankaŭ la veron, ĉar ĝi portas liberon kaj forton.

Vi laboros por la amo, el kiu fluas la vivo. En la vivo estas kaŝita la tuta ĝojo kaj gajeco. Pli alta ol la vivo estas nenio. Vi laboros por la saĝo el kiu fluas la lumo, kiel ĝuo en la vivo kaj kiel scio. Vi laboros por la vero, el kiu fluas la libero, en kiu estas ĉiuj eblecoj por realigi la virtojn. La amo vivas, la saĝo lumas kaj la vero portas la estontecojn. Homo, kiu komprenas la amon, fariĝas senmorta; homo, kiu komprenas la saĝon, fariĝas perfekta; homo, kiu komprenas la veron, fariĝas libera. Per la vivo ni konas la amon; per la scio ni konas la saĝon; per la libero ni konas la veron. Kristo diras: Vi ekkonos la veron, kaj la vero liberigos vin! En la Dia Amo, en la Dia Saĝo, en la Dia Vero estas la abunda vivo, ankaŭ la feliĉo kaj la bono de ĉiuj animoj. Granda estas Dio en sia Amo! Granda estas Dio en sia Saĝo! Granda estas Dio en sia Vero! En sia amo Dio instruas, en sia saĝo Dio lumigas, en sia vero Dio liberigas.

Leviĝu! Leviĝu, kaj en la Vero fortika vi estu!

Leviĝu, kaj en la Amo varma vi estu!

Leviĝu, kaj en la Saĝo luma vi estu!

Se vi volas ion, volu varman, puran koron, plena per amo, kie ĉio kreskas; volu helan menson, kiu portas lumon; volu diamantan volon, kiu venkos ĉiujn malfacilaĵojn.

Trad. P. G. Pamporov (Universala Blanka Frataro)

Opinio pri la **aĵa-ita** Problemo

de T. Mikami havebla ĉe OOMOTO
kontraŭ 2 resp. kuponoj por 1 ekzl.

El la Poezio de Naturaj Gentoj

Laŭda kanto al Dio

La pigmeaj triboj — Ekvatora Afriko

Dio estas, Dio estis, Dio estos!
Spiritoj supre, la homoj malsupre
kaj Dio aparte.
Dio estas prapatro.

Tago post tago,
post arbo alia arbo,
post nubo alia nubo,
alia homo post mi.

Sed Dio daŭras,
Dio ne mortas.
Mortestro li estas.

Malriĉula preĝo al spiritoj

Eskimoj — Norda Ameriko

Ci senpatra kaj senpatrina,
ci kara, malgranda kaj senkoncipa —
donacu peltoŝuojn.

Donacu beston
kun sango je forta supo,
beston el marprofundejo,
ne el tersekejo.
Ci malgranda, ci senkoncipa,
donacu.

Rita kanto

La pigmeaj triboj — Ekvatora Afriko

La lumo nun estingiĝas —
nokto, ankoraŭ pli nokto.

Kaj morgaŭ malsato.
Di' ekkoleris nin.
Prauloj foriris.
Iliaj ostoj forestas,
animoj vagas.
Kie l' animoj estas?
La vento preteriranta
eble scias.

Iliaj ostoj forestas,
animoj vagas.
Ĉu malproksime,
ĉu tute proksime?
Ĉu sangoferadon
ili deziras?
Ĉu ili proksimas,
ĉu malproksimas?

La vento preteriranta,
spirit' foliaron kirlinta:
eble scias.

Indiana nokturno

La tribo de Irokoj — Norda Ameriko

Ah, tiu ega ĉielo!
Profunda kiel riproĉo.
Ĉielo, la troe faŭka,
la malserena,
tro ega
por hometoj!...

Jen iom da oro
per kiu ni ŝute kovros.
la eternecon —
juveloj belaj
per kiuj ni ornamos
la homneniecon.

Stela kanto

Algonkinoj — Norda Ameriko

Jen estas ni,
steloj kantantaj.
Per lumo ni kantas.
Ni estas flambirdoj
sur la ĉielo
rondeflugantaj.

Lum' nia voĉas.
Ni pretigas la vojon
por la spiritoj,
ke tiuj iru ĝin.
Jen inter ni
ĉasistoj tri
ĉaspelas urson:
neniam
ili estis
neĉasantoj.

Ni malsupren
rigardas
montarojn.

Jen
la kanto de steloj.

Kanto al stelo

El Suda Afriko

Ho, stelo jen eklumanta,
mi donas al ci koron mian,
ci donu al mi koron cian!
Ho, stelo jen eklumanta,
igu, ke mi morgaŭ hienon ekvidu,
igu, ke ĝi hundon mortigu,
permesu, ke tiun mi manĝu,
permesu, ke mi satiĝu,
por ke mi povu dumnokte
kuŝi kaj dormi.

Sorĉkanto

Indianoj de l' tribo Pima

— Norda Ameriko

Nun vento ekkantas,
nun vento ekkantas!
La ter' antaŭ mi etendiĝas vasten,
ho, kiom vastegen ĝi etendiĝas!
La venta domo pleniĝas de tondrado,
de tondrado pleniĝas la domo venta,
ĝi pleniĝas de tondrado,
mi migras tra l' brua lando,
tra la lando super kiu furiozas tondro!
Trans venta montaro,
trans venta montaro
alvenis la milpieda vento,
la vento venis ĉi tien, ho, rapidegante —
la vento, nigra serpento, jen venis al mi,
la vento, nigra serpento, jen venis al mi,
ĝi venis kaj rule ruliĝis,
ĝi venis ĉi tien kun sia kanto!

Pri la homa nenieco

Dinkoj — Orienta Afriko

Kiam Dio pratempe kreadis aĵojn —
Li kreis la sunon:
tiu venas, foriras, denove revenas.
Li kreis la lunon:
tiu venas, foriras, denove revenas.
Li kreis la homon:
jen kiu venas, foriras —
kaj ne plu revenas.

La tombo profundas,
ni homoj tie finiĝas.

El la pretigata antologio "Voĉoj el
mallumo", kiun laŭ originalaj motivoj
esp-lingve verkis V. Vinar, Ĉeĥoslovakio.

Parolas nia leganto

Mi havas 60 jarojn. Mi havas tri sanajn filojn. Mi havas tri sanajn genepojn. En 1911 mi fariĝis knaboskolto, kaj en 1912 Esperantisto. Mia patrino edukis min en la kredo, ke ĉiuj homoj estas laŭnature bonaj, ĉar *bona* Dio kreis ilin. (Poste mi legis, kaj aŭdis la konstatojn de antropologoj, ke la natura boneco de la homoj estas fakto.)

Jam de la unua mondmilito mi esploras la temon, kial militoj okazis kaj okazas. Des pli arde mi serĉis kaŭzojn kaj solvon kiam mi edziĝis, patriĝis, kaj aviĝis.

La ĉi-suprajn detalojn mi skribas kvazaŭ ili estu mia antaŭparolo por indiki, mi esperas, ke mi estas sincera en tio kion mi nun skribos.

En via gazeto de Marto-Aprilo, 1960, mi legas finan artikolon pri la gvidprincipoj de Oomoto.

Sub "8" mi legas "La historio de la homaro estis tiu de batalo." La vorto, "batalo," ne estas difinita, tamen la cetero de la artikolo indikas al mi, ke oni pensas pri militistaj bataloj. Miaj unuaj komentoj, tial, baziĝas sur tiu interpreto.

Mi ne konsentas kun la citita aserto, kaj kontraŭ ĝi mi citas la jenajn vortojn de specialisto pri psiko-korpaj malsanoj (*angle*: psycho-somatic illnesses) kaj sociologo. En "Human Ecology" (Homa Ekologio), eldonita de William Maclellan, Glasgovo, Skotlando, en 1948, de D-ro Thomas Robertson, la aŭtoro skribas:

"Kiam ni pensas pri la militiroj de 'Romo', 'Francujo', 'Hispanujo', ni konstataj, ĝis antaŭnelonge, malgrandajn

armeojn de nur kelkaj miloj da homoj, el loĝantaroj kiuj, kvankam ne tiel grandaj kiel nunepoke, ja nombriĝis plurmilione. La historilibroj, kiam oni legas ilin laŭ tiu starpunkto, estas travestioj de la vero. Ili prezentas tendencan bildon kiu, bazita sur la moderna sperto, sugestas militojn inter tutaj nacioj; dum fakte la kruda vero estas, ke tiuj bataloj estis partoprenitaj de malpli da homoj ol tiuj kiuj ĉeestas anglan futbalan ludon je iu ajn sabato posttagmeze. Imagi, ke tia absurda malplimulto de soldataro iel ajn reprezentis nacion de milionoj estas ja 'mito', eĉ pli certe ĉar ni scias, ke ne nur tiuj milionoj estis plejparte analfabetoj, sed ke la komunikado de novaĵoj estis tiel malrapida, ke kredeble la famaj bataloj de la historio estis priaŭditaj, je la unua fojo, de la genepoj de la samtempuloj.

"Legado de la Eŭropa historio bildigas senfinan serion de militoj, tiel ke la leganto sentas naŭzon pro la malsaĝeco de la homaro. Ĉi tio estas la konvena 'mito' kiu konvinkas ĉiun, ke la homo estas batalema besto, kaj ke la historio pravas tion. Sed ĉu ĝi vere faras tion? La senfinaj kaj ofte longaj militoj en Eŭropo faris nenion pli ol grati la surfacon de tiu kontinento. Vere estas, ke pro la malordigo de la loka komercado, la arbitra aliigo de landlimoj kaj dinastiaj ŝanĝoj, multaj homoj suferis multan ĝenon kaj multan mizeron. Tamen, kiam ni pensas pri la malgrava nombro da batalintoj kompare kun la tuta loĝantaro, la malgranda landspaco implikita, ni konstataj kiom

multe da sono kaj furiozo estas en la imagoj de la historiistoj. Mallonge dirite, ni estas trompitaj de la Mito de la Stato..."

La sama aŭtoro, fakulo pri la homa ekologio, atentigas, ke ĉiam soldatoj estis perforte — diversmaniere — 'varbitaj' kontraŭvole en la armeojn.

En la sama numero de *Oomoto* vi raportas, ke Tibor Sekelj asertis, ke "Ĉiuj homoj de kiu ajn nacio estas pacamaj kaj amikemaj. Malpacon kaŭzas nur la politikistoj..." Preskaŭ same diris Tito antaŭ unu-du jaroj al la junularo de Jugoslavujo. Mi ne konsentas, ke la politikistoj kaŭzas militojn. Ili estas pelataj en militojn pro la limigoj de la tutmonda financa sistemo. (Studo de *Socikredito* pravas tion.) La politikistoj fakte strebas eviti militojn.

Skribinte, ke "Ni, Japanoj, sekve devas fornei militon en kia ajn okazo", vi samtempe — laŭ mi nelogike — asertas, ke "Tio, tamen, ne signifas la neon de polic-armeo necesa por la konservado de internaj paco kaj ordo. Ĉi tiu punkto estas grava." Ĉi ja estas grava, ĉar ĝi pravas al mi, ke "vi" opinias, ŝajne, ke la homoj ĝenerale estas malbonaj kaj necesas regi ilin, eĉ perforte. Mi devas atentigi, ke la ĉefa rolo de nacia militistaro estas apogi en la fono la policistaron interne de ĉiu lando por subpremi la enloĝantaron. La brita policistaro, ekzemple, havas kiel ĉefan devon, la defendon de la propra ŝtato!

Mi, do, celas (1) forigon de militistaroj, kaj (2) policistaroj.

Mi ĝojas legi en la sama artikolo, ke vi konstataj la realon de la nacieco, kaj tial la absurdecon de la t.n. "sennacieco". Mi aprobas vian idealon, "diverseco en unueco," kaj "unueco en diverseco". Tute bonintence sed naive kaj pro

neprofunda esplorado de la temo, iuj Esperantistoj opinias, ke la nacieco estas malbonaĵo — eĉ kredas, ke la nura ekzisto de nacioj kaŭzas militojn.

Ni homoj ne bezonas pli da regado super ni en la formo de tutmonda registaro; ni, kontraŭe, bezonas pli da liberiĝo el ĉiu formo de regado super ni, ek de interne de ĉiu lando — ek de la infaneco. La celo estu la plena liberiĝo de la individua homo. (Pri tio oni priatentu la verkojn de S-ro A. S. Neill, kies ĉefverkoj estas haveblaj en la japana lingvo).

Kiel vi povas aserti, ke "la epoko de la naciismo cedas sian lokon por la epoko de 'unu mondo'" dum en la realo pli kaj pli da nacioj lastatempe akiras sian liberiĝon kaj sian sendependecon? Ofte la sopiro al unu mondo en la formo de mondregistaro, k.s., baziĝas sur la erara koncepto pri la kaŭzoj de la mondmilitoj, kiuj fakte estas logikaj rezultoj de la anakronisma tutmonda mon-sistemo.

Do, estimata redaktoro, mi neniel ajn dubas pri via sincereco; mi simple dubas pri viaj konkludoj pri ĝusta solvo de la timiga, terura problemo de la tutmondaj komercaj konfliktoj kaj, sekve, militistaj bataloj.

J. W. Leslie (Londono)

Respondo al S-ro Leslie

Tial ke la vorto "batalo" ne estis difinita en mia artikolo, nia amiko s-ro Leslie komprenis, ke ĝi temas pri militismaj bataloj. Sed bonvolu relegi en la teksto de la 8-a principo la frazon: "milito kaj ĉiu alia ago de perforto", kaj oni facile komprenos, ke la vorto

batalo, kiun mi uzis, signifis ne nur militon, sed ĉian batalon, aŭ malpacon en la plej vasta senco. Ĉu vere la mondo estis en paco tiagrade, ke ni ne povus diri, ke la ĝisnuna historio de la homaro estis tiu de batalo en la vasta senco: batalo interklana, feŭdisma, imperiisma, interklasa ktp., ktp.? Mi opinias, ke ĝi estis plena de teruraj tragedioj de batalo, disiĝo kaj kontraŭstaro, kaj ke la paco, kiun la homaro deziras, neniam ankoraŭ regis la mondon ĝenerale. Estis ĝuste sub tia kompreno, ke en N-ro 1 de mia artikolserio mi citis ankaŭ la vortojn de Zamenhof, kiel: "...Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalajn ideojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio, — tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn...".

S-ro Leslie diras, "ĉiuj homoj estas laŭnature bonaj". Certe, sed ni devas ne forgesi, ke la homo kaj la socio, en kiu li vivas, ankoraŭ ne atingis sian spiritan evoluon sufiĉe, por ke li vivu laŭ sia pura idealismo, t. e. laŭ la homeco, kiu estas laŭnature bona. s-ro Leslie tuŝis la problemon de la homeco, pri kiu oni multe diskutadis de la antikveco.

Ekzemple, la ĉina filozofo Mencio (372—289 a. K.) asertis, ke la homeco estas laŭnature bona. Laŭ li, la koro entenas kvar elementojn, pro kiuj la homo faras virtan agon. Ili estas nome, kompatemo, hontemo, humileco kaj justeco. Se li ektronus infanon falonta en puton, li jetiĝas al ĝi por savi. Tiam, lia ago estas refleksa kaj motivita de nenia utilismo. Lin ne movas la penso, ke per tiu ago li eble povus flati aŭ plaĉi al la gepatroj de la infano, aŭ gajnos laŭdon de aliaj homoj. Nur la kompatemo pelas lin al tia ekstera ago.

Jen unu el la pruvoj, kial la homeco estas laŭnature bona. Sed Mencio rimarkigas, ke la homa boneco ne estas absoluta kaj povas fariĝi malbona ĉefe pro deziro al materioj. Krome, se homo estas lasita longe en malbona medio, lia homeco, kiu estis laŭnature bona, fariĝas malbona. Tial, por ke la bona homeco povu esti konstanta en ĉiaj cirkonstancoj, la homo bezonas fari moralan sinkulturon.

Kontraŭ la aserto de Mencio, alia ĉina filozofo Ŝuncio (300–230 a. K.) diris, ke la homeco estas laŭnature malbona, ĉar ĝi estas radikita en egoismaj deziroj. Laŭ li, ĉio bona ĉe la homo estas nenatura, t. e. aldonajo falsa (unuopa ideogramo 偽 *fals* konsistas el la radikalo 人 *hom* kaj la ĉefparto 為 *far*: *hom-far*). Egoismaj deziroj ne konas limojn, dum la materio por satigi ilin estas limigita. Do, se la homoj, kiaj ili estas laŭnature, estos lasitaj sin doni al sia deziro, la homa socio fariĝos eterna batalejo kaj fine pereos. Por malhelpi tion, la antikvaj regantoj elpensis rimedojn aŭ normojn por bremsi al homoj la deziron laŭ iliaj sociaj rangoj (hierarkio) kaj individuaj kapabloj. Tiuj normoj estas nenio alia ol la etiketoj. El la fakto, ke la etiketoj ne estas spontanaj el la koro, sed bezonis esti *homfaritaj* (de la regantoj) por subpremi la deziron de homoj, Ŝuncio konkludas, ke la homeco mem estas malbona.

Sed ni devas rimarki grandan diferencon, kiu ekzistas inter la "homeco" de Mencio kaj la "homeco" de Ŝuncio. La unua kaptas ĝin en la pura koro. La dua kaptas ĝin en la homa deziro. Se unu estas spirita, la alia estas materia.

Laŭ la instruo de Oomoto, la homeco konsistas el du naturoj: spirita kaj korpa, kiuj estas kontraŭaj inter si. Laŭ sia spirita naturo la homo impetas ĉiam al alto, puro, noblo, justo, filantropio, karito,

altruismo, sinoferemo; ĝi estas fonto de ĉiuj sublimaj sentoj religiaj, etikaj aŭ estetikaj. Kontraste al ĝi, la korpa naturo instigas la homon ĉiam al manĝo, drinko, vesto, seksemo, ktp., eĉ al pekoj kaj malvirtoj, kaj en ekstremaj okazoj, degenerigas aŭ koruptas lin en malhoman egoiston. Kvankam tiuj du kontraŭaj naturoj ĉiam luktas inter si en la homo, ambaŭ estas necesaj por ke li ekzistadu kiel homo. Sen nutri la spiritan naturon, li fariĝos besto. Sen nutri la korpan naturon, li perdos eĉ la eblecon por memkonservado. Sufiĉas imagi, kio okazus se ni restus sen manĝo, ekzemple. Sed inter ambaŭ naturoj troviĝas ordo en la senco, ke unu devas superregi la alian. Kompreneble, la spirita naturo devas superregi la korpan. Se tiu ordo estas observata, la homeco estas en ordo, t. e. bona (spirit-super-korpismo). En la mala okazo, la homeco estas malbona (korpo-super-spiritismo).

A. Rejzin

Kiam floras....

*Kiam floras verdarbetoj,
Ŝvebas flugas kantbirdetoj
Kaj la sun' ridetas lumas
Ĝi al ĉiu palpebrumas —
Mi demandas en la koro:
Ĉu somera estas horo?*

*Floroj velkas, se mi vidas,
Birdoj en la kaĝoj sidas
Kaj la sun' malofte estas
Nur la ventoj fajfas festas —
Ne demandas mi la koron:
Mi jam konas tian horon!*

El la hebrea tradukis:
D. J. Rabinoviĉ Tajc, Izraelo

Nu, ni revenu al nia tezo: la ĝisnuna historio de la homaro estis tiu de batalo (en la plej vasta senco). Tio signifas, ke la homaro laŭ sia spirita naturo ankoraŭ ne estas evouinta sufiĉe kaj pro tio, pekadis per malordaj agoj kaj kondutoj. (Nia mondo, same kiel la homaro, ankoraŭ estas malperfekta, ĉar ĝi estas sub la regado korpo-super-spiritisma). Kaj se oni celas la forigon eĉ de polic-armeo en la socio, kie la homeco ankoraŭ ne estas kulturita por ke ĝi estu konstanta, oni tro ignoras la realon de la mondo.

Eĉ en la Ĉielo — laŭ la Oomoto-revelacio — ekzistas speco de administracia sistemo, laŭ kiu ĉiuj spiritaĵoj regoj estas regataj en ordo. Mi opinias, ke la ideo, ke ni sur la tero bezonas "liberiĝi de ĉia formo de regado super ni", estas evidente absurda.

Jasuo Sakurai
Trad. T. N.

Sinjoro Suno, feren ŝnuron

YANAGIDA Kunio

Antaŭ longa longa tempo en unu vilaĝo loĝis patrino kaj ŝiaj tri infanoj. Iam, post kiam la patrino eliris viziti la templon, lasante la hejmon gardi al la infanoj, venis al ili *yamauba**, kiu transformis sin en la patrinon. La manoj de *yamauba* estas facile rekoneblaj, se oni palpas ilin, sed la infanoj prenis ĝin por sia patrino, ĉar ŝi estis volvinta, por trompi ilin, sekigitajn tigojn de kolokasio ĉirkaŭ siaj manoj, kaj ili akceptis ŝin malferminte la pordon. Ŝi enlitiĝis en la profunda ĉambro kun la plej eta infano, kaj formanĝis ĝin kun krak-krakegoj. La du aliaj infanoj, kuŝantaj en apuda ĉambro, aŭdis la bruojn kaj demandis al la *yamauba*-patrino, kion ŝi manĝas. Responde ŝi ĵetis al ili el sia ĉambro unu etan fingron; je tio ĉi ili tuj vidis, ke ŝi estas ja *yamauba*, kaj ili interkonsiliĝis pri eskapo: Unue, la dua infano diris, ke li volas iri al la necesejo; la *yamauba* do ordonis al la pli aĝa malfermi la pordon por li. Tiel la du eliris la domon, faris noĉojn per hakileto al persikarbo apud puton, kaj laŭ tiuj grimpis la arbon. La *yamauba*, postkuris ilin, kaj dum ŝi serĉadis ilin tie kaj ĉi tie, ŝi enrigardis la puton kaj trovis ilin sur la persikarbo. Kiel vi grimpis la arbon? demandis ŝi. La pli aĝa mensogis, ke ili grimpis per pomadoŝmiro. Ŝi alportis pomadon kaj per ĝi ŝmiris la persikarbon, sed ŝi neniel povis grimpi pro glatglitado. La dua infano ridis je tio kaj diris: Kiu povus grimpi per

pomadoŝmiro! Oni grimpas ja farante noĉojn per hakileto. Ŝi aŭdis tion kaj komencis grimpi farante noĉojn per hakileto. La du infanoj, tute embarasataj, turnis sin al la ĉielo kaj laŭte kriis: Sinjoro Suno, feren ŝnuron! Jen tiam kun kraktintado ekpendis el la ĉielo fera ĉeno. Ili kaptis ĝin kaj iris supren al la ĉielo. Post ili la *yamauba* ankaŭ kriaĉis la samon, sed ĉifoje venis el la ĉielo putrinta ŝnuro, kaj ŝi, kiu kaptis ĝin kaj volis supreniri, falis el alto sur kampon de poligono, kie al ŝi la kapo frakasigis kontraŭ ŝtono, kaj ŝi fine mortis. La tigo de poligono estis kolorita de la sango de la *yamauba*, kaj de tiam, oni diras, ĝi estas tiel ruĝega.

Trad. KONISI Gaku

*) *yamauba*: laŭlitere "mont-avino", ina monstro folkloro.

Abonu por 1961!

LA PRAKTIKO

La Gazeto de la Mondpopolo

Abonprezo por unu jaro: 32 Steloj
Japanaj ges-anoj sendu ¥ 760
al la Redakcio de OOMOTO

Eldonejo:

UNIVERSALA LIGO

Riouwstraat 172, Den Haag,
Nederlando

La 15-a Datreveno

Hieraŭ estis 15 aŭgusto, la 15-a datreveno de Japana malvenko en la milito. Infanoj naskitaj en 1945 nun estas en la tria grado de mezlernejo. La Zengakuren-studentoj, kiuj ŝancelis Japanujon per siaj manifestacioj kontraŭ la Sekurec-traktato kaj gajnis famon ĉirkaŭ la mondo, estis infanoj tiam en la aĝo de tri, kvar, aŭ kvin jaroj. Dekkvin jaroj faras epokon.

Kvankam 15 jaroj pasis, la minaco de milito ne malpliigis nun ol iam antaŭe. Estas absolute maleble, ke Japanujo lanĉus militon kiel en la antaŭa okazo. La danĝero nun estas, ke Japanujo kaj la cetera mondo estos envolvita en la infera fajro de nuklea milito.

La popolo de ĉiu lando scias per sia kapo la hororon de milito, kiun oni farus per nukleaj bomboj, sed ĝi neniam vidis per sia okulo la efektivan katastrofon mem. Eĉ ni japanoj, escepte la rektajn viktimojn, ne povus diri, ke ni vere scias la terurojn de nuklea bombo. Do estas tute nature, se fremduloj, kiuj vidis Hiroŝimon kaj Nagasakon hodiaŭ, pensus, ke ekzistas ne tro granda diferenco inter tiuj kaj la Eŭropaj urboj, kiuj estis detruitaj dum la milito.

Ja pro tiu ĉi kaŭzo, samkiel pro aliaj, estas necese revidi la bildojn de Hiroŝimo kaj Nagasako en la tempo tuj post kiam la atombomboj estis faligitaj. Kiel Akira Iŭasaki, la kino-kritikisto, skribis en sia letero al la *Asahi Shinbun*, la dokumenta filmo farita de la mortinta d-ro Joŝio Niŝina neniam ankoraŭ estis prezentita al la publiko.

La kameristo, kiu filmis la bildon, estis arestita de Amerika Ĝendarmo en Nagasako. Li estis poste permesita daŭrigi la filmadon, komisie de la Usona esplor-grupo por strategia bombado, sed

la filmstriojn konfiskis la ĉefstabejo de Generalo Mak-Arturo. Tamen, unu malneta kopio eskapis konfiskon de la Usona armeo. Tiu ĉi kopio, oni diras, estas konservita en la teko de kino-kompanio.

Tiu ĉi filmo nepre devas esti prezentita al la publiko. Se ĝiaj posedantoj kaŝas ĝin pro timo ofendi Usonon, ili estas tro malvastanimaj.

Tiu ĉi filmo povas fariĝi efika rimedo por nepriigi, ke la atombomba tragedio neniam estu ripetita. Ĝi estu montrita tra la mondo, precipe al la popolo de tiuj landoj, kiuj posedas nukleajn bombojn.

Tio estas la ĝusta speco de tasko, kiun Gensuikjo — la Japana Konsilantaro Kontraŭ A- kaj H-bomboj — devas plenumi. La lastatempa 6-a Mondkongreso Kontraŭ Atomaj kaj Hidrogenaj Bomboj kaj Por Totala Malarmado difinis Usonon kiel la "malamikoj de paco". La rezolucio adoptita de la mondkongreso ŝajnis ignori la fakton, ke Rusujo ankaŭ posedas nukleajn bombojn. Se ĝi nomas unu partion en la malvarma milito "la malamiko" kaj la alian partion "la amiko", ĝi ne plu havas rajton nomi sin movado kontraŭ nukleaj armiloj.

Movado por malebligi nukleajn armilojn ne devas koncerni sin je ideologiaj konfliktoj. Estos multe pli bone klopodi tiel, ke la supredirita dokumenta filmo estu montrita al la mondo.

La japanoj, kiuj estis la unua popolo en la mondo por ricevi la baptismon de nukleaj bomboj, devas agnoski, ke ili havas unikan respondecon en la movado por malebligi nukleajn bombojn.

(El la rubriko "Tensei-ingo" (Vox Populi, Vox Dei) de *Asahi Shinbun*, trad. D. R.)

Vojago al Brazilo

Brazilo, laŭ ĝia areo (8.500.000 kvadrataj kilometroj) estas la plej vasta el ĉiuj latinamerikaj landoj. Sed la plej granda parto de tiu vastega teritorio (pli malpli 6 milionoj da kvadrataj kilometroj) estas ankoraŭ dezerta kaj eĉ nekonata, kovrita de densaj praarbaroj.

En unu el tiuj senhomaj lokoj de la ŝtato Goiás, antaŭ nur kvar jaroj, la prezidanto de Brazilo parolis jene: "De tiu ĉi centra altebenaĵo, de tiu ĉi izoleto, kiu baldaŭ aliformiĝos je cerbo de la altaj naciaj decidoj, mi ekrigardas ankoraŭ unu fojon la morgaŭon de mia lando kaj antaŭvidas tiun ektagiĝon kun nerompebla fido kaj senlima konfidemo al ĝia granda destino".

Ekzakte en tiu sama loko leviĝas nun Brasília (elparolu: Brazilja), la nova ĉefurbo de Brazilo, inaŭgurita la 21an de aprilo 1960.

Mi ankoraŭ ne vizitis tiun tute freŝbakitan "Ĉefurbon de la Espero", kiu baldaŭ havos 200.000 loĝantojn. Sed mi intencas tion fari en la proksima estonteco.

Mi nun volas rakonti vojaĝon, kiun mi entreprenis antaŭ kelka tempo al nia najbara lando Brazilo.

Mi vizitis antaŭe, en la argentina provinco Misiones, la akvofalojn de l'Iguazú, vera mirindaĵo de la naturo, kies grandiozan spektaklon mi neniam forgesos.

Poste mi enŝipiĝis en Puerto Aguirre. En Foz do Iguazú, unua brazila haveno, la aŭtoritatuloj petis niajn dokumentojn. Ni elŝipiĝis en Porto Mendes, kie malgranda vagonaro transportis nin al La Guayra. Tie ĉi ni vizitis la kaskadojn

Sete Quedas, tre belaj, sed ne tiel grandaj kaj imponaj kiel la akvofaloj de l'Iguazú.

Surŝipe mi daŭrigis mian vojaĝon laŭlonge de la rivero Alto Paraná. Dum tri tagoj ni nur vidis la riveron, kiu mallarĝiĝas iom post iom; ties akvoj malhelaj turniĝas furioze.

Oni bone vidas la du bordojn, kovritaj de densa praarbaro. Inter aliaj kreskaĵoj mi ofte rimarkas "ambay" (elparolu: "ambai") kaj "tacuara" (elparolu: "takua"; ĝi estas speco de granda kano).

Fine ni alvenis al haveno Presidente Epitacio, kie ni envagoniĝis.

Ni faris 30-horan vojaĝon ĝis ni alvenis al São Paulo. La vagonaro trairas la ŝtaton São Paulo laŭ ĝia tuta longo. La pejzaĝo estas plaĉa: montoj, ne tre altaj, kaj pitoreskaj valoj, kovritaj de palmoj, bananujoj, kafarboj kaj kotonujoj, k.t.p.

Tiu regiono estas loĝata de multaj eksterlandanoj: italoj, japanoj, hungaroj, germanoj, k.t.p.

Fine ni alvenis al São Paulo, la dua brazila urbo laŭ ĝia loĝantaro kaj unua industria urbo de la tuta Latinameriko.

São Paulo ne estas tipa brazila urbo. Italoj kaj germanoj (kaj iliaj idoj) konsistigas la plimulton de ĝia loĝantaro.

Mi pasigis plurajn tagojn en tiu grava urbo. Mi vizitis la muzeojn, ĉefe la Ipiranga-n, la Instituton Butantan kaj aliajn vidindaĵojn.

Poste mi iris al Santos, kie mi pasigis tri ravajn tagojn en la marbordo. Guarujá, kiu kuŝas en la insulo Santo Amaro, apud Santos, estas unu el la plej

belaj strandoj de Sudameriko, laŭ mia opinio.

Mi ankaŭ iris al Poços de Caldas (Ŝtato Minas Gerais), tre grava varmobanastacio, kien alfluas ĉieaj mal-sanuloj.

Fine mi iris al Rio de Janeiro.

Eble nenion novan mi povas diri pri tiu urbo, kiu certe meritas la alnomon "Mireginda Urbo". Mi tie pasigis 16 ĉarmajn tagojn kaj eble ne vidis ĉiujn vidindaĵojn.

Kiel en kalejdoskopio mi vidis la montojn Korkovado kaj Sukerpano, la golfeton Guanabara, la insulon Paquetá, la marbordojn, la Botanikan Ĝardenon, k.t.p.

Mi vojaĝis al Petrópolis per omnibuso, sur bonega ŝoseo, kaj ĝuis miregindan tropikan pejzaĝon. Ankaŭ mi iris al Terezópolis, al Nicteroy kaj ĝiaj strandoj. Mi ne scias kio plej plaĉis al mi, ĉar ĉio estis bele.

Fine mi ĉestis la karnavalajn festojn en la stratoj kaj avenuoj. Mi ĉefe memoras la balojn dum dimanĉo nokte, sur la avenuo Rio Branco, kie amasego

da personoj freneze dancis laŭ melodioj disaŭditaj per laŭtparoliloj.

Mi faris du vizitojn al la sidejo de Brazila Ligo Esperantista. Mi tie konatiĝis kun eminentaj samideanoj kaj pluraj aliaj geesperantistoj, kiuj tre afable traktis min.

Kun bedaŭro mi forlasis la Miregindan Urbon kaj direktis min suden. Mi vizitis Curitiba-n, ĉefurbo de la ŝtato Paraná; Paranaguá, haveno ligita al Curitiba per tre pitoreska fervojo. Mi ankaŭ vizitis Florianópolis, ĉefurbo de la ŝtato Sankta Katarino kaj Porto Alegre, ĉefurbo de Rio Grande do Sul.

Uruguayana estas la lasta brazila urbo kiun mi vidis. Poste mi trairis la riveron Uruguay kaj eniris en Paso de los Libres (Corrientes, Argentino). Per fervojo mi iris al Concordia; mi trairis la provincon Entre Ríos per omnibuso ĝis Paraná; per pramo mi trapasis la samnoman riveregon kaj alvenis al Santa Fé. Fine omnibuso transportis min al Córdoba, mia urbo, post foresto de du monatoj kaj duono.



São Paulo

Pri “Memuaro pri la Kanto de Kverka Monto”¹⁾

Sei Ito²⁾

En la aŭtuno de 1956 la *Chuo Koron*, unu el la plej malnovaj kaj plej renomaj revuoj, oferis premion por la plej bona verko prezentota de nova aŭtoro, kaj la premio fine estis donita al Ŝiĉiro Fukazaŭa por lia “Memuaro pri la Kanto de Kverka Monto”. Fukazaŭa, laŭ sia propra diro, estas viro de kvardek-unu jaroj kaj tial ne unu el la pli junaj novecentoj. Lia premiita rakonto ne nur surprizis la tri profesiajn kritikistojn kiuj agis kiel juĝantoj, sed ankaŭ movis ilin al unu-anima laŭdo.

Plej multaj nuntempaj japanaj noveloj kaj noveletoj estas verkita en realisma stilo pruntita el Eŭropo, kaj la tipa traktado de homaj rilatoj estas multe influita de moderna Eŭropa humanismo. Tamen, nek la realisma metodo nek la tipo de pensado, kiun ĝi envolvas, pruvis sin perfekte kongrua kun la emocia dispozicio de la japanoj, saturita de la antikvaj tradicioj de Budaismo kaj Ŝintoismo.

Unu el la plej tipaj modeloj en fikcio daŭrintaj pli ol kvindek jarojn estas la aŭtobiografia novelo (*ŭatakuŝi ŝosecu*), en kiu la aŭtoro aŭ la “mi” de la novelo sin tenas kontraŭ la socio kaj rakontas ĉion el sia intense introvertita vidpunkto. Ordinare tiaj noveloj alprenas al si la eksteran aspekton de Eŭropa realismo, sed samtempe ili kutimas esprimi la sentojn, kiuj estas tipaj de la japanaj inteligentuloj. Ili konsistigas tre specialan branĉon de literaturo, kiu estas, oni povus diri, intelektuale flankenstara. Multaj junaj verkistoj klopodis disbati al si la limojn de tiu ĉi tro persona formo kaj

verki pri siaj rilatoj kun aliaj en la aktualaj kadroj de socio, sed neniu rikoltis senkondiĉan sukceson.

Konsentite, ke ĉiuj homaj estaĵoj estas esence la samaj, oni tamen devas akcepti, ke, kiam iu individuo devas fronti al specifa situacio aŭ fari decidon, la impulso, kiu movas lin, tre povas esti regata de la religio aŭ la tradicio de partikulara kulturo, al kiuj li apartenas. En Japanujo ĉi tiu impulso inklinas alpreni al si unu el du laŭŝajne kontraŭaj aspektoj. Laŭ unu, ĝi movas la individuon klopodi teni lian propran pacon de koro je ĉiaj kostoj — rezigni kuniĝi kun aliaj por starigi logikan harmonian socion, kaj anstataŭe apartigi sin de la vanteco kaj abomeneco de la lin ĉirkaŭanta ĉiutaga mondo. Tio ĉi estis la vojo elektita de la ermitaj pastroj de la pasinteco, kiuj sin retiris en la suprojn de montoj por vivi en glora soleco. En iom modifita senco, ĝi estas la vojo elektita de plej multaj japanaj literaturistoj, ĉar kvankam modernaj verkistoj loĝas en la mezo de socio, ili ordinare ne prenas aktivan parton en politikaj aŭ sociaj aferoj, kaj ili tendencas resti spirite apartaj disde la cetera homaro.

Tiu ĉi impulso tamen povas esprimiĝi ankaŭ en alia maniero, kiu estas tute kontraŭa al la unua, kaj kiun Eŭropanoj sendube trovos fanatika. Specife dirite, ĝi agas kiel furioza instigo al la individuo sin oferi por la feliĉo de lia hejmo, lia komunumo aŭ lia nacio. La sento envolvita en tiu ĉi okazo estas nek logika nek racia. Ĝi estas pia kaj desperada. Kompreneble, ĝi ne estas emocio,

kiu estas propra nur al la japanoj, ĉar en antikvaj tempoj la judoj ankaŭ montris ĝin. Tamen, en Japanujo ĝi ankoraŭ vivas hodiaŭ, kaj ĝi estas la kaŭzo, kial dum la dua mondmilito junaj japanaj pilotoj ĵetegis siajn aviadilojn kaj sin mem al malamikaj ŝipoj kiel se ili estus ne pli ol nura municio.

Supraĵe, ĉi tiu sento aperas barbara. Tamen troviĝas io kortuŝa kaj bela en la volonteco de viro rezigni sian vivon por sekurigi la bonfarton de aliaj, eĉ se la ofero eventuale fariĝos malkalkulita kaj senefika. La kerno-punkto ĉi tie estas, ke tiu ĉi tipo de emocio estas, en la japana spirito, nur alia aspekto de la impulso, kiu igas kelkajn fortranĉi sin de la cetera mondo. La du tipoj de konduto estas malsamaj flankoj de la sama monero.

Modernaj japanaj intelektuloj konscias, ke la baza impulso ne kongruas kun humanismo, kiu celas krei harmonian socion, kaj ili kritikas ĝin tre forte. Sed samtempe, tiel longe, kiel ili mem daŭrigas sian intelekte izolitan vivon, ili efektive nur rifuzadas la moralajn postulojn, kiujn implicas ilia rilato kun aliaj. Kiam japanoj ekagas en morala maniero, la malnova impulso ĉiam sin trudas. La nepovo rekonigi tion ĉi estas la baza malforteco de moderna japana penso kaj la kaŭzo de la malrapideco, laŭ kiu Okcidenta penso penetras en Japanujon. Unuvorte, la moralaj implikaĵoj en la homaj rilatoj ankoraŭ estas manko-punkto en japana literaturo.

“Memuaro pri la Kanto de Kverka Monto” tuŝas rekte tiun ĉi manko-punkton kaj admirinde sukcesas pleniĝi ĝin. La ofero entenita en la intrigo estas bazita sur malnova legendo, kiu diras, ke en antikvaj tempoj tro maljunaj homoj por labori estis forkondukitaj de

siaj infanoj en la montojn kaj lasitaj morti. Neniu scias, ĉu tia terura kutimo iam ekzistis en Japanujo, sed ĝi troviĝas en japana folkloro. Kaj troviĝas almenaŭ unu monto, en Nagano-prefektujo, kiu estas nomata Ubasute-jama aŭ “la monto por forĵeti maljunulinojn”. Folkloristoj diras, ke laŭ unu tradicio, neĝado post kiam maljuna homo estis kondukita al la monto, estis konsiderata bonaŭgura, dum laŭ alia, se la luno lumis, tio estis feliĉa. “Memuaro pri la Kanto de Kverka Monto” sekvis la legendon pri neĝado.

La novelo estas en kelkaj rilatoj realisma, sed kio estas pli elstara estas ĝia ritma kompono, kio probable ŝuldas iom al la fakto ke la aŭtoro estas profesia gitaristo. Verŝajne per hazardo, la rakonto akordas kun la plej modernaj konceptoj de stilo. La afero kiu tiom surprizis japanan literaturan rondon, tamen, estis ne la supereco de la prikskribo, sed la ekkonstato, kiun la novelo kaŭzis, ke por kapti la veran karakteron de la japanoj oni devas malfermi sian okulon al la moraleco de sinofero. La forto de la rakonto de s-ro Fukazaŭa klarigis, ke japanoj ne povas esti re-produktitaj en fikcio sen konsideri la movimpulson, kiu venas de antikvaj religio kaj tradicio.

“Memuaro pri la Kanto de Kverka Monto” estas nenio pli ol mito, sed la impulso post ĝi estas morala, kaj pro tiu ĉi kaŭzo ĝi frapas nin per terura forto. Certe ĝi meritas legadon de ĉiu, ĉu japano aŭ ne-japano, kiu interesiĝas en la morala rilato inter la individuo kaj aliaj.

(Laŭ la afabla permeso de l' aŭtoro tradukis: *Teruo Mikami.*)

¹⁾ Tradukita en la kvar antaŭaj numeroj

²⁾ Novelisto kaj literaturkritikisto

Recenzo

★ ZAMENHOF de Iŝmael Gomes Braga, eld. de "Nia Stelo", Rua de Pedrouços, 95-2, Lisboa, Portugalujo. 65 p. (10.5 × 15 cm). Prezo ne montrita.

La broŝureto ne estas biografieto pri Zamenhof. La aŭtoro elektis en ĝi belajn tekstojn el la verkaĵoj de nia Majstro laŭ tiu konsidero, ke oni komprenu, kiamaniere la ideoj de la kreinto mem evoluigis la esp-movadon ĝis la nuna stato de mondskala progreso. La tutan verkon penetras la altaj pensoj de nia genia bonfaranto de la homaro en akompano de la komentoj de la nobl-pensa aŭtoro. Legi tiujn eterne freŝajn pensojn estos granda ĝuo por ĉiu leganto. Bonvena eldonaĵo, en la Zamenhof-Jaro. Makuleto estas la troviĝo de deko da prezeraroj, inter kiuj eĉ gramatike gravaj.

N. Esumi

★ SELAJANG PANDANG BAHASA ESPERANTO, verkita en indonezia lingvo de Liem Tjong Hie; eld. de Indonezia Esperanto-Instituto, ĉe Toko Djohar, Dj, Gadjah Mada 60, Semarang, Indonezio. 80 p. (12 × 16 cm). Prezo: 4 rpk. plus 1 rpk. por sendkosto.

La broŝuro konsistas el 3 partoj. La 1-a parto (6 paĝoj) estas probable la prezenteto pri Esp. kaj Zamenhof. (La lingvo en teksto estas por mi volapuk-ajo.) La dua (19 p.) estas klarigo de la gramatiko de Esp. kaj la cetero (41 p.) estas dediĉita al vortareto. Mi ne scias,

ĉu ĝi estas verkita kiel lernolibro, aŭ kiel propagandilo. Mi nur gratulas la unuan signon de l' aktiveco, esperante, ke la movado en tiu lando prosperos pli kaj pli, por ke indoneziaj samideanoj laŭeble multe partoprenu la Universalan Kongreson en Tokio 1965.

N. E.

★ LUDOVIC LAZARUS ZAMENHOF, 8-paĝa bildlibro (17.5 × 23 cm) de "Inventisto de Esperanto" kun teskto en la angla lingvo. Eld. de Brita Esperantista Asocio, 140, Holland Park Avenue, London, W.11, Anglujo. Prezo: 6 pencoj plus 3 pencoj por afranko.

Kiel represaĵo el "Daily Sketch Modern Boys Annual" tiu ĉi broŝuro estas eldonita en la Zamenhof-Jaro, kunlabore de la redaktoro de la nomita libro kaj J. W. Leslie, sekretario de B. E. A. Ĝi konsistas el 41 koloraj bildoj, faritaj per la lertaj manoj de Colin Andrew. Ilin akompanas konvenaj tekstoj prezentante la biografieton pri nia Majstro.

N. E.

★ PRI LA VORTFARADO EN ESPERANTO, verkita de J. R. Isbrucker. (Oficiala bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 2) Represo el Esperantologio 11:13-36, 1959. 24 p. (15 × 21 cm). Habebla ĉe UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando, kontraŭ 6 steloj aŭ 1.50 gld.

La prezidanto de la Akademio de Esperanto ĉi tie prezentas la sintenon de la Akademio rilate la vortfaradon en Esperanto. Por lumigi la demandon li pritraktas la ĝisnunajn pristudojn de Couturat, René de Saussure, Höveler, Panel k.a. La temo estas interesa kaj grava, sed en ĝi ne estas prezentita la teorio de K. Kalocsay (entenita en "Plena

Gramatiko de Esperanto").

N. E.

★ JUĜU MEM! — Faktoj pri Ĉeĥoslovakio. Eldonita de ORBIS (ŝtata eldonejo), Prago, Ĉeĥoslovakio, 1960. El la ĉeĥa lingvo esp-igis Miloš Lukauš. 81 paĝoj kun vortoklarigo kaj indekso; 12 × 16.7 cm. Habebla ĉe: Ĉeĥoslovaka Esp-Komitato, Blanická 4, Praha 12, Ĉeĥoslovakio, kontraŭ unu respond-kupono.

Tiu ĉi libreto prezentas en dek ĉapitroj la prosperigantajn faktojn pri industrio, komerco, agrokulturo kaj multaj aliaj faktoj de Ĉeĥoslovakio. Ĉiu paĝo estas dense presita per malgrandaj preslitteroj. Tiaspeca informilo, cetere eldonita ankaŭ el aliaj landoj pli-malpli laŭ ŝtata propagando, estas utiligebla kiel propagandilo por Esperanto samtempe.

J. Umeda

★ BIBLIOPHILOS, aparta kajero el la organo (n-ro 2, 1959) de libro-kolektantoj en Finnlando pri la finnlanda esperantoliteraturo. Verkita de Hellevi Aimola, bibliotekistino de Universitata Biblioteko, Helsinki. 20 p. (15 × 21 cm). Seriozaj esperantologoj kaj gravaj bibliotekoj povas enmanigi kontraŭ 1 rkp. ĉe la Fondumo Esperanto, Matinkyla, Helsinki, Finnlando.

La katalogo konsistas el tri kronologiaj listoj: esperanta, priesperanta literaturo kaj gazetoj. Valora laboro imitinda en ĉiu lando.

★ JARLIBRO de U.E.A., 1960, *Unua parto*; 458 paĝoj plus 6 malplenaj p. por notoj. Liverata nur por membroj de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando. Bedaŭrinda konstato: la listo de

Esp-grupoj kun iliaj adresoj malgrandiĝis je 11 paĝoj ol tiu de la lastjara.

★ VIENNE, 6-paĝa faldfolio de la franca urbo Vienne, 27 km okcidente for de Liono (Lyon). Eld. de la Syndicat D'Initiative. Habebla ĉe s-ro Groussad, telefonestro ĉe la Poŝtoŝefejo de Vienne, Francujo.

★ POR SENARMIGŬO, POR PACO KAJ AMIKECO INTER LA POPOLOJ, raporto antaŭ la Kvina Eksterordinara Sesio de la Parlamento de Popola Respubliko Bulgarujo farita de Anton Jugov, 7-a de marto 1960. Eld. de Eldonejo de Literaturo en Fremdaj Lingvoj, Sofio, Bulgarujo. 27 p. (14.5 × 20 cm) Prezo ne montrita.

★ BRUSELO, 16-paĝa ilustrita prospekto (10 × 14 cm) pri la belga ĉefurbo; eld. de Informa Centro de Bruselo, rue du Chene 10, Eiken straat, Bruselo, Belgujo, laŭ instigo de la L.K.K. de la 45-a U.K.

★ BRUSELO BELGUJO, 10-paĝa faldfolio (10 × 20 cm) pri Bruselo, kun multaj artaj kolorbildoj; eld. de la supra eldonejo laŭ la sama instigo.

★ ANTVERPENO ATENDAS VIN, 12-paĉa gvidilo (20 × 21 cm) pri Antverpeno, kun multaj bildoj; eld. de la urbo Antverpeno laŭ instigo de la Esp-Societo "Verda Stelo".

★ OLOMOUC, 20-paĝa prospekto (11 × 15 cm) pri la ĉeĥoslovaka urbo Olomouc, la centro de la terkultura teritorio, kun multaj foto-bildoj; eld. de Ĉedok, Na Prikopě 18, Praha 3, Ĉeĥoslovakujo.

Esp-istaj Gejunuloj Fondis

Societon en Uberlândia



Ni kun plezuro prezentas ĉi tie tri fotojn el la pluraj, kiujn niaj geamikoj en Uberlândia, MG, Brazilo sendis al ni. Ili estis faritaj la 14-an de julio ĉe la aŭditorio de Radio Educadora de Uberlândia, okaze de la fondo kaj enoficiĝo de la estraro de Esperantista Junularo de Uberlândia (E. J. U.). La belegan festvesperon partoprenis pli ol cent personoj, kaj ilian ceremonion alestis kaj briligis la reprezentantoj el plej diversaj rondoj, registaraj fakoj, ĵurnalejoj, grupoj de gejunuloj ne nur en Uberlândia sed el la najbaraj urboj.

La E. J. U. estas filiiginta kun Brazila Esperantista Junulara Unuiĝo (kun la sidejo en Rio de Janeiro), kiu siavice estas ano de Tutmonda Esperantista Unuiĝo. La fotoj montras:

1) Samideano s-ro Hélio Cardassi, nome de Uberlândia Esperanto-Klubo, donacas Esperanto-flagon al E. J. U. pere de ties Prezidantino f-ino Nelva Ribeiro.

2) De maldekstre dekstren: d-ro C. A. Wutke, delegito de UEA kaj Konsilanto de E. J. U., s-ro Carmo Capparelli, Kasisto, f-ino Dolvira Santos Lima, 2-a Sekretariino, f-ino Áurea de Paula, 3-a Sekretariino, f-ino Adília de Souza, 1-a Sekretariino, kaj f-ino Nelva Ribeiro, Prezidantino.

3) La ĉeestantaro de la Inaŭguro de E. J. U.